# AMERIKA ESPERANTISTO

JUNE, 1921



La VLTAVA Bordo Praha

OFFICIAL ORGAN OF

THE ESPERANTO ASSOCIATION

OF NORTH AMERICA

Digitized by Google

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN *of*

The Esperanto Association of North America, Inc.

**a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.**

Yearly Memberships: Regular $1.00: Contributing $3.00: Sustaining $10.00; Life Members $100.

**CO-EDITORS: NORMAN W. FROST H. M. SCOTT MRS. I. M. HORN**

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

**Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—$1.00.**

BERKELEY, CALIF.
Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.
Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Bibliotekisto, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.
San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall. F-ino Evelyn M. Rosher, 125a Beulah St.

Kalifornia Esperantista Rondaro meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secy., 946 Central Ave.

MONTREAL, CANADA.
Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

TORONTO, CANADA.
The Toronto Esperanto Club meets every Saturday at 7. P. M. at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec.,E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

WASHINGTON, D. C.
La Kabea Esperanto Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thompson School, XIIth and L Sts., N. W.

Kolumbia Esperanto Asocio. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

CHICAGO ILLS.
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

BOSTON, MASS.
Boston Esp. Soc.. 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.
Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

PORTLAND, ME.
Portland Esperanto Society. Mrs. E. C. Flint, Sec., 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.
Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M-9P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.
La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave. B. Lendo, Sek. 3596—29th St.

HEBRON, NEBRASKA.
La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun Jaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

HOBOKEN, N. J.
"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

NEW YORK CITY, N. Y.
The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the third Friday of each month 6.45 P. M. Information from the Secretary.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.
La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

ERIE, PA.
La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, inĝ., St. John Kanty College eldonas ½-jaran jurnalon, "La Studento," jara abono $1.00.

PHILADELPHIA, PA.
Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo.. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

PITTSBURGH, PA.
Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.
Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Digitized by Google

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

**WEST NEWTON 65, MASS.**

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

**A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.**

**Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.**

**One Dollar a Year.** **Single Copy Ten Cents.**
**Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.**

**Published Monthly by**
**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**
The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 28. June, 1921. No. 2.

## THE FRENCH ACADEMY OF SCIENCE SPEAKS

"The undersigned, members of the Academy of Sciences,

convinced that the adoption of the auxiliary language Esperanto in international relations would have far-reaching consequences in the way of the progress of the sciences and their applications; that it would permit the diffusion of French Science abroad, and hence diffuse the intellectual influence of our land,

are resolved:

1. that the teaching of this tongue, a masterpiece of logic and simplicity, should be introduced, at least as an optional study, in the official program of scientific classes in all teaching establishments;

2. that, in international congresses, it should be adopted as an official language on an equality with the national languages, up to the time that experience shall confirm its fitness to become the sole official language;

3. that the attention of directors of scientific and technical publishing houses be called to the value that the use of this language would present for them, in their publications destined for the outside world;

4. that, from now on, the leaders of thought and scientists should prepare themselves for its use in their relations with their foreign colleagues, and inform them when they are ready to so use it;

5. that a committee be appointed to get together and elaborate vocabularies for the sciences purely in Esperanto, and that the tech-

Digitized by Google

nical societies be invited to do likewise within the lines of their specialties."

(Signed by)

**D'Arsonval,** professor of Physiology in the College of France

**Daniel Berthelot,** president of the French League for Enlightenment and of the Society for Aerial Navigation

**Bigourdain,** astronomer at Paris Observatory, President of the international committee on the Hour, member of the Bureau of Longitudes

**General Bourgeois,** senator, ex-director of the Army Geographical Staff, member of the Bureau of Longitudes

**Gaston Bonnier,** professor of Botany at the Sorbonne

**C. Breton,** deputy and ex-minister

**J. Carpentier,** maker of Instruments of Precision, member of the Bureau of Longitudes

**Charpy,** director general assigned to the Society of Steel and Iron of the Marine at Homecourt

**Constantin,** professor of Botany at the Museum of Natural History

**Deslandres,** director of the French Society of Oceanography, member of the Bureau of Longitudes

**Admiral Fournier,** president of the French Society of Oceanography, member of the Bureau of Longitudes

**P. Janet,** director of the Central Electrical Laboratory, president of the French Physical Society

**C. Lallemand,** inspector-general of Mines, director of the Orographical Service of France, member of the Bureau of Longitudes

**Maurice Leblanc,** president of the international Electro-Technical Committee, ex-president of the International Society of Electricians

**Lecornu,** inspector-general of Mines, Professor in the Polytechnic School

**Lindet,** professor of the Institute of Agronomy, ex-president of the Society for the Encouragement of National Industries

**Lumiere,** administrator of the Society of Lighting Plants at Lyons

**The Prince of Monaco,** president of the Section of Oceanography, International Union of Geodesy and Geophysics

**Charles Richet,** professor of the Medical Faculty, member of the Academy of Medicine

**General Sebert,** president of the Council of Administration of Foundries and Docks of the Mediterranean

**Fernald Widal,** professor of the Faculty of Medicine, member of the Academy of Medicine

(members of the Academy of Sciences.)

**'Nuf Said! Next!**

Digitized by Google

## UTILA UZADO DE ESPERANTO VOJAĜANTE

En tiu ĉi epoko estas eble travojaĝi la mondon uzante nur esperanton; sed tion fari, estas necese sin antaŭprepari per la akiro de la adresoj de esperantistoj kiuj loĝas en la landoj vizitotaj. Unufoje konatiĝinta al la samideanoj al vojaĝanto malaperas ĉiaj malfacilaĵoj.

Kvankam mi efektive ne faris tion ĉi, tamen miaj spertoj en fremdolandoj rilate esperanton, jam certigis al mi la eblecon tiel fari.

Dum la jaro 1919 mi min trovis en Siberujo, kiel ano de la brita misio al tiu lando.

Antaŭ ol forveturi de Anglujo, mi havigis la nomojn de kelkaj esperantistoj en Siberujo de la U. E. A.

Alveninte en Ĥarbino, Manĝu[r]ujo, mi veturis vagonare tra Siberujo en Eŭropan Rusujon ĝis la punkto de la maksimuma antaŭeniro de la Armeoj de Kolĉak. Poste mi revenis Omskon, kie mi vizitis la sekretarion de la Esperantista Societo, S-ro Kolĉin. Kvankam mi neniam antaŭe parolis esperante mi trovis nenian malfacilaĵon kompreni aŭ kompreniĝi.

Reveninte Ĥarbinon, mi vizitis la Prezidanton de la tiea Societo kaj ni interparolis longatempe.

Poste mi loĝadis en Vladivostoko ĉirkaŭ unu monaton kaj mi senprokraste interrilatiĝis kun la esperantistoj en tiu urbo. S-ro Vetoŝinski kaj aliaj min ricevis per brakoj malfermitaj kaj aranĝis, ke mi renkontu aliajn samideanojn. Mi vespermanĝis kun ili, kaj ni libere interparolis dum tri horoj pri diversaj temoj sen malfacilaĵoj. Ĉi tiu estis nur mia kvara provo. Ankaŭ per esperanto kaj la bonvola konsento de miaj esperantistaj amikoj, mi ricevis raportojn pri la fervoja tiama striko, kiuj estis utilaj; **ruse tio tute ne estus ebla.** Ĉiu el ili min traktis kiel fraton, pruvante, ke la internacia lingvo estas vera ilo de frateco.

Poste mi iris al Ĥabarovsko sur la Amuro, kiu urbo estis antaŭe la registara sidejo por orienta Siberujo.

Mi tie renkontis kun Generalo Savitski, kosaka. Li estas tre fervora esperantisto kaj tre interesa. Li portis medalon, kiun li ricevis, kiel honoraĵon pro siaj servoj al la afero, priparolinte kaj klariginte la internacian lingvon al la Caro de Rusujo. Tiun ĉi medalon la Petrogradaj esperantistoj donacis al li.

Vizito mia al la militkaptita tendaro okazigis la varbadon de ĉirkaŭ 100 aliaj al la tendara esp. rondo. Ne de ia peno mia, sed simple ĉar ili tiam komprenis ke per esperanto, brita oficiro, kiu tute ne sciis la hungaran lingvon, povis interparoli libere kun la hungaraj oficiroj en tiu tendaro, kiuj estis ankaŭ esperantistoj.

Tiam mi veturis vaporŝipe kontraŭflue la Amuron ĝis Blagoveŝĉensko. Tie mi renkontis S-ron Pargaĉevski, ĵurnalisto, kiu intervjuis min esperante kaj publikigis la intervjuon ruse en la loka gazeto.

Nu! je finiĝo de mia vizito al Siberujo mi nur komencis paroli kaj kompreni la rusan lingvon kaj do nur neperfekte.

Mi opinias tial, ke eble post jaroj de loĝado en tiu lando povas eksterlandano esperi akiri eĉ mezbonan sciadon de la lingvo, sed, nur

Digitized by Google

mallonga studado de la internacia lingvo necesas por povi kompreni kaj kompreniĝi.

Mi nun ne timas vojaĝi al kiu ajn lando se mi scius ke mi povus renkonti kun esperantistoj. Ekrigardo je la jarlibro de la U. E. A. sufiĉe montras, ke restas nur malmultaj landoj, kie oni ne povus interrilatiĝi kun samideanoj.

Edw. M. Rosher, Majoro
San Francisco, Calif.

---

## ABSURDA BOJKOTO

Estas konata trajto de nia homa naturo, ke se iu grave ofendis nin en unu rilato, ni tuj inklinas kondamni lin pri ĉio, kion li faris, faras kaj faros, eĉ bonegan. Tiamaniere ni malutilas ofte ne la kontraŭ ni pekintan, sed nin mem, forrifuzante aferon, kiu tre servis nin en antaŭa tempo, kaj nur havas la malfeliĉon esti kreita de la homo malaprobata.

Antaŭ ne multaj monatoj la Esperantistaro posedis inter si ĉie uzatan kaj oportunan monsistemon, kiu ebligis, ke oni ekkonu je l' unua rigardo le precizan orvaloron de ĉiu citita prezo el kiu ajn lando. La bazunuo estis sufiĉe malgranda, por ke oni povu per la sistemo traduki sen sentebla perdo aŭ troigo ĉiujn monerojn de la tuta mondo. La terminojn de la sistemo oni enkorpigis en ĉiun Esperanto-nacian vortaron. Per flugfolioj kaj aliaj propagandiloj oni laŭdkantis kaj reklamis la elpenson eĉ por ne-Esperantistoj. Nia Majstro honoris la sistemon per ties ekskluziva uzado en sia klasika Marta.

Kio nun fariĝis la spesmiloj? Ili malaperis de la abonprezkolonoj de gravaj Esperantaj gazetoj. Oni plu ne trovas ilin apud la nacimonaj ciferoj en librolistoj kaj katalogoj. Redaktoroj kaj eldonistoj akcentas la diferencon inter svisaj frankoj kaj francaj frankoj, inter markoj kaj krejceroj. Kaj pro la gravaj kursoŝanĝoj de la postmilita mondo oni troviĝas jam en vera ĥaoso pri l'efektivaj valoroj de la diversaj naciaj monoj. Dume per la spesa sistemo oni povus ĉiam traduki la siatempe precizan sencon de ĉiu monero de ĉiu lando, tute same kiel oni faris antaŭe.

Ni demandas nin, kial en pasinta tempo, kiam la monoj estis relative senŝanĝaj oni uzadis la spesan sistemon, sed nun, kiam pro la fluemeco de l'internacia financo tiu sistemo estus **duoble utila,** donante al tutmonda vido ĉiam ĝustan esprimon de la variemaj valoroj, oni la iam laŭdegitan rimedon preskaŭ subite jam forĵetis*? Nur unu klarigon de tiu stranga fenomeno ni povas konjekti: tion, ke la aŭtoro de la spesa sistemo freŝdate pekis kontraŭ la lingvo Esperanto. Tiun pekon ni egale kun ĉiuj fideluloj kondamnegis kaj kondamnegados. Sed de tio ne sekvas, ke ni devas malbontrovi nun ĉion ajn, kion Prof. de Saussure faris en la tuta vivo, kaj por puni lin devas senigi nin je elpensaĵo, kiun ni uzis jam de jaroj kun plej granda utilo al ni mem.

---

[*Kompreneble multloke oni ne povas kalkuli la valoron de la papera mono (orpromeso) rekte, sed nur pere de monkurso kun mono facile interŝanĝebla por oro. Uzante spesmi**lojn,** la prezoj restas fiksitaj, eĉ se la kurso ŝanĝas.]

Digitized by Google

La nuna kvazaŭ-bojkoto de la spesa sistemo ŝajnas al ni sencela kaj absurda, kaj almenaŭ ĝis kiam iu elpensos internacian montraduksistemon pli praktikan, ni uzados kaj propagandos ĝin kiel ĉiam.

H. M. S.

## ESPERANTO PAROLEJO

**In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and address required.**
**En sed ne pri Esperanto | ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulataj**

(The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head, the facts are on the authority of the person named. **Not** open for any articles upon Esperanto subjects proper.)

### Kontraŭ la Eraro pri Lutero en la Aprila Kajero.

La skribanto rakontas kelkajn erarojn malnovajn, kiujn ĉiu luterano scias kvazaŭ eraroj kaj kiujn mi estas preta por rifuti multfoje el skriboj de Lutero mem, se necese. Lutero ja starigis la Biblion kiel solan religian aŭtoritaton, sed li ankaŭ doktrinis ke la Biblio estas mem-interpretanta. Religio estas aŭ la afero de la individuo, kiu por ĝi estas respondeca nur al Dio, ne la afero de la civila estraro aŭ la papo ktp. Precize tion li asertis Aprilon 17an kaj 18an je Worms (Vorms) 1521 (kiel la unua!) antaŭ la imperiestro kaj papaj ambasadoroj dum la germana parlamento. Sed li ankaŭ doktrinis, ke neniu devas prediki aŭ instrui en la eklezio sen eklezia komisio, kaj ke la eklezio estas la juĝisto ĉu lia doktrino estu laŭbiblia aŭ ne. Memkompreneble ne estis partianoj sed kontraŭuloj de Lutero kiuj ne konsentis resti tiel, sed interpretis la biblion por si mem. Li konservie nur tiujn ceremoniojn kiujn li rigardis ne-kontraŭbibliaj. Li aprobis multajn plendojn de la kamparanoj sed li ne aprobis ilian revolucion kun bruligo, rabado kaj buĉado, sed konsilis ke oni pace interkonsentu kaj admonis ke la estraroj plibonigu la staton de la kamparanoj. Kiam la estraroj subigis la revolucion, kiun li kondmnis, li ankaŭ publike kondamnis la severajn venĝojn de la estro kaj nobeluloj, sed tie oni ne aŭdis lin. Li ne permesis korpajn punojn kontraŭ herezuloj sed nur eksigo de ili el la eklezio kaj kontraŭstaris eklezian enmikson en polikaj aferoj sammaniere ol estraran enmikson en religiaj aferoj. Tie ĉi li estis tre diference de Zvingli kaj Kalvin aŭ la amerikaj pilgrimpatroj.

Rev. Theo. Hanssen, Box 785, Bremer, Iowa.

Altaja Societo Esperanto, Bijsk, Siberio.

12 Dec., 1920.

Karaj Samideanoj:

Helpu al ni en disvastigo de nia kara lingvo. Ĉe ni nuntempe regas absoluta literatura malsato, tre mankas esperantaĵoj, ktp. Sendu ĉion kion vi povas. Sendu krom tio provnumeroj de "Amerika Esperantisto" nuna kaj pasintaj jaroj.

Vi estos tre kaj tre dankitaj,

Prezid. de Societo, Avasil.

### Portretisto Malsatas

Estimataj Samideanoj!

Konsiderante nunan tre mizeran staton de arto en Polujo, mi kiel artpentristo preskaŭ tute ne havas mendojn. Tio ĉi absolute neebligas mian ekzistadon.

Digitized by Google

Mi do, kiel membro de U. E. A., turnas min al vi, estimataj samideanoj, helpi al mi per sciigo, kiaj estas prezoj ĉe vi de la sekvantaj specoj de portretoj:

1. Arte mandesegnita, nekolorigita, pligrandigita ne per fotaparato busto de natura grandeco.

2. Arte manpentrita per oleaj farboj sur tolo, ankaŭ de natura grandeco busto. **Unua kvalita laboro,** (sen trograndigo) **kiel de naturo.**

3. Ordinare pligrandigita fotografaĵo per fotaparato, ankaŭ arte finellaborita.

Samtempe kun via afabla respondo estus tre dezirinde al mi ricevi ian, eventuale kelke da mendoj.

Oni devas sendi al mi fotografaĵon, aldonante kian specon el la suprecititaj portretoj oni deziras.

Koncerne la 2a supre, mi petas turni vian atenton je detala kolordifino de okuloj, vizaĝo, haroj, vesto, ktp., kio por bona plenumo de portreto estas nepre bezona.

Karaj samideanoj! Mi humile vin petas ne rilati sin al tiu ĉi letero facilatente kaj helpi al mi laŭ via trovo.

La plenumita portreto estos bone enpakigita en fortika tubo.

Koncerne la pagon bonvolu alsendi malgrandan parton de la sumo samtempe kun la mendo. Restonta parto estos alpagota dum la ricevo en via poŝtoficejo.

Respektplene,
Leono Zylberglejt,
Str. Ogrodowa 46, Siedlce, Polujo.

Membro de U. E. A. 13974.

---

Noto de la loka Delegito de U. E. A.

Mi, subskribinto, konante persone S-ron Zylberglejt kaj vidante lian laboron, certigas vin pri lia honesteco kaj atestas pri lia ege mizera stato. S-ro Zylberglejt kiel varmega Esperantisto indas esti subtenita de ĉiu samideano.

Ĉestavo Pruski, Del. U. E. A., No.12049.

---

**"Liberiga Stelo" al la Internaciistoj!** Kiu volas rapidigi la triumfon de Esperanto en la laboristaro; enirigi lumon kaj sanan spiriton en la esperantan movadon; helpi la eldonadon de literaturo internacie kuniga; unuvorte labori je la kreado de sennacieca—ununacia—popolo, tiu senprokraste aniĝu al "L. S." kaj abonu ĝian oficialan organon: Esperantista Laboristo.

Statutoj kaj provnumero estas riceveblaj interŝanĝe de 1 stampita Resp. Kupono (aŭ alio samvalora) adresota: 23 rue Boyer, Paris XX.

---

## Sciencistoj en la XIIIa Kongreso

Estas bezone, ke la sciencistoj-esperantistoj havu post longa tempo denove okazon pridiskuti gravajn temojn, kiuj interesas esperantismon egale grave kiel la sciencon. La XIIIa kongreso estos okazo por tio. Oni certe bone scias, ke la scienca progreso ne efektiviĝas dum sciencistaj kunvenoj, sed oni egale certe scias, ke oni multon pro-

Digitized by Google

fitas aŭskultante saĝajn raportojn pri la akiritaj sukcesoj kaj meditante dum la diskutado, kio nun estas farota kaj antigota. Tre grava, ĝojiga, kaj instruema ĝuo estas en la dumkongresa kunveno aŭskulti raportojn pri la ĝis nun atingitaj rezultatoj en la esperanta faka scienca terminologio, kiujn prelegos fakuloj de koncernaj sciencoj. Mi organizos tiajn raportojn laŭ ĉiuj sciencoj kaj petas sinjorojn kolegojn pri afabla sciigo, pri kia scienca terminologio ili estus pretaj raporti (mi mem faros raporton pri la ĥemio). La raportoj eldonitaj poste en libro estos certe instrua lingva verko de esperanto.

Ĉiujn koncernajn proponojn bonvolu afable sendi (kun respondkupono aŭ neuzitaj poŝtmarkoj) al

Dr. Stan. Kamaryt
profesoro de reallernejo en Bratislava,
Telocvična 3, Ĉeĥoslovakio.

---

**La Internacia Universitato.**—Sidejo: Monda Palaco, Bruselo.

La Konsilantaro de la Internacia Universitato kunvenis en Bruselo al 24an kaj 25an de marto. Ĝi notis komunikaĵojn senditaj de la universitatoj en Zurich, Lisboa, Praha, Bristol, Kjobenhavn, Leiden, Liverpool, Tokio, Cambridge, Warzawa.

Ĝi definitive decidis pri la dato kaj daŭro de la dua kunsidaro de la Universitato, kiu okazos de la 20a aŭg. ĝis la 15a sept. en la sidejo de la Universitato. La ellaborita programo citas la kunhelpon de 80 diversnaciaj profesoroj, kiuj faros proksumume 300 lecionojn. Universitata rondvojaĝo estos organizita, kiu donos al ĉiu studento la okazon por viziti unuope aŭ grupe la de li elektitajn fremdajn universitatojn.

La Konsilantaro de la Internacia Universitato nun konsistas el. S-roj Altamira (Madrid), Appleton (Lyon), Boillot (Bristol), Fueter (Zurich), Jonesco (Bucureŝt), La Fontaine, Otlet (Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj), Smets (Bruxelles), Tille (Praha), Volterra (Roma).

**Kongreso por la Organizo de la Intelekta Laboro.**

Laŭ iniciato de la Unuiĝo de l'internaciaj asocioj okazos nunjare "Tutmonda Kongreso por la organizo de la intelekta laboro." Ĝi okazos la 20an, 21an kaj 22an de aŭgusto proksima kaj ĝin ĉefe okupos la studo pri la nunaj vivkondiĉoj de la intelekteco kaj de la intelektuloj. Samtempe komenciĝos la dua kunsidaro de la Internacia Universitato, kiu daŭros ĝis la 15a de septembro. Aliaj kongresoj estos organizataj dum la sama periodo. Ĉiuj tiuj kunvenoj kaj kongresoj trovos lokon en Bruselo, en la "Monda Palaco," kiun la belga registaro afable metas je la dispono de la Unuiĝo de l'internaciaj asocioj.

---

## El Hungario

**Estimata Samideano:**

Ni petas vin: ne koleru, por ke ni embarasas vin per nia letero Estu bonkora: akceptu nian peton! Kolektu inter viaj samideanoj kaj inter viaj bonkoraj amikoj por hungaraj mizeruloj!

Digitized by Google

Sendu monhelpon, aŭ ŝuojn, vestojn, juvelojn, aŭ aliajn, kiujn vi povas sendi.

Donante tuj, oni donas dufoje! Monon oni povas sendi en rekomendita letero, aliajn en poŝtpaketo.

Je la nomo de Esperanto Societo.

Adresu: S-ro Izso Laszlo, delegito de U. E. A., en Szombathely, Hungario, Eŭropo.

Por Esp. propagando bonvolu sendu bildkarton sur bildflanko algluita poŝtmarko.

## "MOKA"

(Mondjunulligo Katolika)

Moka jam bone progresas. En diversaj landoj delegitoj estas starigitaj kaj kelkaj lokaj grupoj vigle agadas. Tamen granda parto de la katolika junularo ankoraŭ dormas. Vekiĝu, samideanoj, kunlaboru al la nobla celo, unuigi la tutmondan katolikan gejunularon per Esperanto! Akceptu la oficon de Moka delegito por via urbo kaj atentigu la junulsocietojn katolikajn aliĝi al Moka. Diskonigu la Moka institucion de "internacia leterŝanĝado inter kat. junuloj."

Helpu ĉiumaniere al la disvastigo de Moka-penso. Kat. Junuloj. En viaj manoj kuŝas la sorto de Moka. Tial antaŭen por nia bela celo!

Detalajn informojn donas la "Centrejo, Graz, (Aŭstrujo) Karmeliterplatz 5.

Hanns Sappl,
Sekretario de Moka.

**Pola Esperanto Servo !**

1. Donas ĉiujn ajn informojn pri Polio (informejo-peradejo).
2. Konatigas Polion eksterlande (gazetservo).
3. Deziras havigi ĉiujn Esp.aĵojn por la Esperantistaro de Polio.

Polaj samideanoj en Ameriko, dezirantaj iun ajn sciigon el aŭ pri Polio skribu tuj. (Por respondo aldonu 1 internacian resp. kup.)

Adreso: Pola Esp. Servo (P.E.S.), Fr. Prengel, Bydgoszcz 17, Polio.

---

## KRONIKO

**Washington, D. C.**—Klason instruas B. P. Mann.

**San Francisco, Calif.**—Du klasoj, 12 studentoj.

**Boston, Mass.**—Oni donacis la Lueders libraron precipe binditaj gazetoj, vortaroj, ktp., al Bostona Publika Biblioteko, kiu promesas apartan fakon Esperantan. Prez. Payson lastatempe vojaĝis al Chicago kaj Washington kaj revenis al sia kampara domo en Lexington.

**Gloucester, Mass.**—Bedaŭrinde lastsemajne ruiniĝis la famekonata ŝipo "Esperanto," gajninto de la internacia fiŝŝipkonkurso, kaj pro tio projektita postkongresa vojaĝo per ĝi en Bostona haveno estos neebla.

**Chicago, Ill.**—Klaso funkcias. D-ro Ŝimonek baldaŭ ekvojaĝos Prahaon.

Digitized by Google

**Detroit, Mich.**—Dimanĉon, majon 15an, oni festenis la 59an naskotagon de samideano D-ro Tobias Sigel.. Parolu ĉeestinto:

"Je la 8-a horo matene oni kunvenis antaŭ la Esperanta Oficejo, Breitmeyer Building, sur la strato Broadway. Tie jam staris kelke da grandaj platformaj aŭtomobiloj kun 20 seĝoj sur ĉiu. Sur tiuj ĉi aŭtomobiloj ni veturis al la Esperanta farm-bieno de nia festenanto, kiu troviĝas 35 mejlojn malproksime de la urbo, je Perfection, Alcona Graflando.

"La aŭtomobiloj estis ornamitaj per niaj standardoj, steloj kaj helkoloraj surskriboj; oni povis vidi, ke ni havas grandan nombron da samideanoj en Detroit. Ĉiu aŭtomobilo estis plena de diversaj nacioj kaj rasoj—eĉ la negra raso ne mankis—kaj la aero pleniĝis per Esperanta babilado.

"Sur la stratoj, oni haltas, rigardas, legas, kaj miras.

"Ni atingis la Esperantan farmo-bienon; ni ekkonis ĝin de malproksime: grandaj Esp. flagoj estis videblaj, kiuj flirtis alte en la aero. Ni estis surprizitaj vidante, ke renkonte al ni venas granda nombro da samideanoj kaj samideaninoj, ĉiuj vestitaj en diversaj Esp.-ĉapoj kaj en aliaj vestoj kun Esp. ornamaĵoj. Ili estas la domanoj kaj parencoj de la festenanto. Ni salutis unu alian, konatiĝis, kaj ili bonvenigis nin. Muziko, dancoj, manĝaĵoj, trinkaĵoj, deklamoj, kantado kaj paroladoj. Post la tagmanĝo la festenanto sidiĝis sur azenon kaj rajdis ĉirkaŭ la arbaro en akompano de ni ĉiuj. Estis bela parado. Oni haltis ĉe la rivereto, en kiu ni vidis boatojn kun metala surskribo "La Esperantisto." Post parolo de la festenanto, parolis S-ro C. Leidich kaj aliaj. S-ro D. Szulec havis tre belan, fluan Esperantan paroladon, en kiu li salutis la festenanton en la nomo de Pola Esp. Asocio. Fine ni kantis 'La Espero' akompanate de muziko, kaj ni remarŝis al la farmo-domo kun kantoj kaj salutkrioj. Ĝis la kvina horo posttagmeze la s-ano Fr. Schafus kaj aliaj amuzis la ĉeestantaron per belegaj deklamoj kaj kantoj. En Esperanto oni kantis ĥore kun muziko 'Rozeto en herbejo' de Goethe, 'La bona kamarado' de Uhland, 'La Tilio' de W. Muller, k.a. Poste paroladis S-roj Leidich kaj A. M. Koliner; la lasta estas antaŭ nelonge veninta el Eŭropo kaj pasigas kelkajn semajnojn en Detroit. Li klarigis, ke D-ro Sigel festenas hodiaŭ ne nur la 59an jaron de sia naskiĝo, sed li festenas ankaŭ la 11-an jaron de sia esperantistiĝo. Lia parolado faris bonan impreson, kaj ĝi konvinkis ĉiujn, ke Esp. estas lingvo belsona kaj vivanta. Fine D-ro Sigel varme dankis la kunvenintojn pro la honoro, kiun oni faris al li partoprenante en lia festeno. 'La pordoj de mia hejmo,' li diris, 'estas ĉiam malfermataj por ĉiuj. Ĉiu pasanto povas veni por kvietigi malsaton kaj soifon.'

"Longe, longe niaj Detroitaj samideanoj ĝuos la belajn memorojn de tiu tago."

Seman Farano.

**St. Louis, Mo.**—Hon. Richard Bartholdt, malnova eminentulo (kiu prezentis al usona kongreso bilon por enkonduko de Esperanto en la lernejojn de la D. de C.) prezidis koncerton en kiu kantis 1,000 voĉoj por la savo de infanoj de centra Eŭropo, je la Coliseum, Majon 18an.

Digitized by Google

**New York, N. Y.**—23an de Majo paroladis S-ro Morton kaj aliaj je tagmanĝo de la "Sunrise" Klubo ĉe Cafe Boulevard, 41a kaj Broadway. Oni diskutis psikanalatike la problemojn de amvivo.

—31an de Majo, kunveno de Walt Whitman's Club, ĉe la Scribner Bldg., 6a Ave. kaj 19a Strato; konferenco pri Homaramo kaj Frateco; S-ro Selly parolanto.

—26an de Majo, ĉe Struntzky's restoracio, debato Esperante por kaj kontraŭ Bolŝevismo de S-roj Arnold kaj Morton.

—10an de Junio okazos Harmonio Barĉo ĉe la Little Rumanian Casino, 120—2nd Ave.

—13an de Majo la Harmonio Barĉo sukcesegis. 50 ĉeestis; parolis Esperantistoj de Polujo, Germanujo, Ĉekoslovakujo, kaj Brazilio. D-ro Selly paroladis pri Frateco; S-ro Morton pri propagando; S-ro Sussmuth pri la progresoj en N. J. Oni akceptis fraŭlineton el Algiers, Nordafriko, kiu recitis Esperantaĵojn. Anoncoj en New York Herald kaj Sun.

—New York Evening Post publikigas por-Esperantajn artikolojn.

**Union Hill, N. J.**—Junion 4an kunvenis Hudson county Esperanto Societo ĉe Braunstein's Cafe, 60 Hudson Ave., invitis ĉiujn samideanojn.

## WORLD NEWS

In Mount Albert, Surrey Hills, Victoria, Australia, Esperanto is making steady progress and the group meets weekly under the presidency of F-ino E. A. Sinnotte.

In Sofia, Bulgaria, Esperanto has been made a required subject in the five months course for teachers. 80 students are taking part; S-ro Atanasof is the Esperanto instructor.

At Cremona, Italy, the Esperantist group arranged a public meeting in the largest theatre and the thousands of citizens there gathered, having heard of the progress of Esperanto, unanimously voted a petition that Esperanto be introduced in the public schools.

The Germana Esperanto Asocio membership almost tripled in the past year.

In Finland during the past year 20 courses had about 2,000 students of Esperanto. Esperanto Finnlando has now 400 foreign and 800 home subscribers, more than one for each 4,000 inhabitants.

In Omsk, Siberia, S-ro B. Najdin teaches Esperanto in the Institute of Agriculture and Industry; 122 are studying Esperanto. Also club, two young people's clubs, and courses at military institutions, in all 135.

In the first of May demonstration in Hyde Park, London, a miner and a railway man presented Esperanto from the viewpoint of the proletariat.

Besides the obligatory courses at Geneva in the 7th grade, La Chaux des Fonds, Sev., is to have official courses in the two upper grades.

The following **international fairs** are now making use of Esperanto: Barcelona, Spain; Lisboa, Portugal; Lyons, and Paris, France;

Digitized by Google

Basl, Switzerland; Praha, and Reichenberg, Czechoslovakia; Budapest, Hungary; Helsinki, Finnland; Breslau, Leipsig, and Frankfurt-an Main, Germany; Utrecht, Holland; Padua, Milan, and Trieste, Italy.

French readers will find the complete report of M. Baudet presented and adopted by the Chamber of Commerce of Paris in the Jan.-Feb. number of Le Monde Esperantiste (0.60 f.)

Sparta, Greece, has a new local group with 120 members; courses taught by Sam. Kristostomis.

The diamond workers' league of Antwerp has begun Esperanto courses.

In Hungary Esperanto is waking up; lively meetings twice a week in the Social Museum, Budapest, 30 or 40 present. 70 pupils of Esperanto in course at Szeged state 'gimnazio.'

Karlovo, Bulgaria; Esperanto society at the Scienca Gimnazio counts 150 member-students—great enthusiasm—correspondents wanted. Write to S-ino Co. Cvetkov, Str. Vojniŝka 26, Karlovo.

A proposal before the Queensland teachers' convention in January, that Esperanto be put into the program of all schools of the realm nearly carried, 30 votes to 33. The Australasia Labor Party will consider a like resolution.

Louise Briggs has taken first prize in the Brita Literatura kaj Debata contest for 1921, as in 1920, with her translation of Tennyson's "Passing of Arthur."

The problem of an international language is upon the order of the day for the IInd Socialist International Congress now meeting at Moskow, Russia.

The Swedish parliament's upper house has approved the proposal of Mayor Lindhagen of Stockholm:—that the government seek as effectively as possible, to sustain the proposal of the Swedish world-language committee before the League of Nations.

An Esperantist Office has been opened at 38, rue Consolat, Marseilles, France. It aims to give all information on commercial and other matters, to receive visiting Esperantists, and to sell Esperantaĵoj of all descriptions.

The Chamber of Commerce of Reichenberg, Czechoslovakia, by letter of March 2, has announced its entire sympathy with the Esperanto movement and its readiness to accept and answer any commercial correspondence in that language.

Jan. 1, 1921, the "Instituto de Sociografio" (Sociology) was founded by Prof. Moacyr Caminha of Bd. Nogueira Accioly, Fortaleza, Ceara, Brazil. to use Esperanto in advancing humanity.

The military aviators' school of Tashkent, Turkestan, has put in Esperanto as a voluntary study. The courses began Dec. 24; other courses at the L. Tolstoj School.

Scholars or priests knowing Latin, in lands not yet provided with Esperanto text-books, may be interested in J. Bianchini's "Parva Grammatica, cum glossario esperanta-latina," published at S. Vito al Tagliamento, Italy.

The entire postal personnel of the free state of Danzig was officially invited by Postmaster-General Zander to a lecture on Esperanto,

Digitized by Google

Jan. 14, 1921, in the chief post office. Some 150 attended, and a course of 60 has started.

The Finnish government, after considerable animated discussion, voted a subsidy of 25,000 marks to the Esperanto Office at 20 Kasarminkatu.

In Venice, acting at the recommendation of the Italian Ministry of Marine, Prof. Pizzi has opened a free course with over 100 pupils.

New Esperantist labor groups have started in Funchal, Madeira.

In the past year some 20,000 Esperanto textbooks were sold in Finnland. The government permits the use of Esperanto in telegrams and delegates of the U. E. A. may hang up signs in Post Offices and railroad stations.

Esperanto during 1920 was taught in 22 German public schools.

---

## CORRECTIONS TO GAZETARO

With regard to our list of magazines in the March number, we have received information that **La Kritikulo, Fluganta Skribilo,** and **Universo** (??) are dead.

**L'Esperanto** and **Itala Esperantisto** should have been quoted at 15 lire; **Espero** at 20 rubles and **La Esperanto Movado** at 50 rubles per number; **Laboro** at 16 r. k., **Internacia Komerca Revuo** at 7 sv. fr.; and **Verda Ombro,** now of 4 printed pages at 8 sm.

The address of **La Espero** is now E. S. E., Stockholm 1, and of **Itala Esperantisto,** Rossari 2.

There are also to be listed the following:

**Internacia Socia Revuo,** W. Nutters, van Ostradestr. 94, Amsterdam, Holland, 3m.
**Regeneracio,** Lauria 39—1o, Barcelona, Katalonia, Spain.
**Al Eterna Lumo,** Buro Porcyne, Vitebsk, Russia(?).
**La Marto, Haiqa,** Czechoslovakia, m. 8 l.p. 20 r.k.E.
**Internacio,** suite 203, 15 Park Row, New York, N. Y. w. 2p. (typew.).
**Mitteilungen der Danziga Esperanto Asocio,** Stadtgraben 5 in der Verkehrzentrale, Danzig, m. 6p. (Germ. script. hekt.).
**Ĥina Brileto,** K. C. San, 11 Lin jen Rd., W. Gate, Shanghai, China.
**Homaro,** J. Mangada Rosenorn, Jaca Huesca, Spain, 16p., 1 r.k.
**La Radio,** grupo Siedlce, Poland (typew.).
**La Voĉo de la Popolo,** Sinpak, 50 Ping Yueng Li St., Fat Shan, Canton, China. E. Eng. & Chin.
**Estonia Esperantista Revuo,** (Reval?), Esthonia (typew.).
**Kalifornia Folieto,** K. E. Rondaro, 946 Central Ave., San Francisco, Calif., Usona, 3m. 2p. mim.
**Monda Poŝto,** Fischenthal ap. Zurich, Svislando, okaze.
**Nederland-Esperanto,** Spitaalstr 3, Zutfen, Nederlando, w. 2.40 guld. (=? Nederlanda Esperantisto?).
**Ladina Esperanto** (announced).
**Samideano,** O. Ziegler & Ko., Marktredwitz, Bavaria, Germany.
**Dia Regno,** K. E. Ligo, (with Kristana Esperanto).
**Homela Esperantisto,** Homel, Russia(?).

---

Just as we go to press notice has been received of the death on May 19 of Countess Natalia Von Schenck, of Los Arcos, Mexico, a long time and faithful adherent of the Esperanto Cause.

---

Digitized by Google

## VENU SUNO !

Envenu la suno
En mian ĉambregon
Kun viaj radioj brilantaj
Atendas vin bruno,
Noktega nigrego,
Envenu radioj sanantaj.

Envenu sanigi
La koron vi mian
La koron la mian vunditan
Ho venu plenigi
La bruston vi mian
Per ĝojo kaj amo lumitan.

M. Safir, Jaffa.

---

## FOR THE STUDENT

### Translate into Esperanto

Mme. Curie

She is the woman who has given away all of her precious discovery to the hospitals, and the laboratories, and is now without any herself, or the means of buying any; the one who lives on a teacher's salary in France and who didn't have any coal to heat her rooms last Winter—because of her poverty.

"I gave my secret to the world. It was not to enrich anyone. It was for all the people." There you have her, the apotheosis of creative science.

Now for the contrast: On the same day she lands in New York with her announcement that her precious discovery is a means of saving life, we read a story from Washington. It seems that new and deadly series of scientific products have been evolved; and the War Department is cooperating with the Navy Department to experiment with them in June.

There is brombenzyicyanide—a new tear-gas which will blind men for life in an instant. And there is diphenyichlorasine—a new toxic smoke, which will strangle men to death in a moment. And there is poison dust—which will blow with the winds and slay all life with deadly speed. "As a result of these discoveries," says the dispatch, "ships will have to be airtight if their crews are to escape destruction."

And there you have the perfect portrait of a kind of science which is supported by appropriations from Governments.

**Question:** Why do American scientists have no time to learn Esperanto?

Digitized by Google

## VERDA STANDARDO

Stelon esperan verda standardo
Flirtas nun ofte fiere,
Tiu emblemo de avangardo
Amon semante espere.

Ĝi estas signo de Esperanto,
Helplingvo de tuta la tero,
Kiu fariĝas la triumfanto
En sfer' de kulturo kaj vero.

Sub flago tiu Esperantanoj
Tutan fratigas homaron.
Celo ilia, ke homaranoj
Havu nur unu gentaron.

Ili penadas ke tuta mondo
Bela fariĝu Edeno
Iĝu homaro unu fratrondo
Kaj ĉie regu kompreno.

Ja ne pereos ideo ĉi-tia
Esperantanoj konkiros
Mondon obstinan, kaj regno Dia
Sur ĝi triumfe aliros.

(Tradukita el Litova gazet-almanako "Darbininkas," 366 Broadway, Boston 27, Mass.)

---

**English as she is spelt!—Let's inquire?**

Visiting poliglot (who has learned English at home)—I went into the church and heard the **ĉoir.**

American—What?

P.—The, the **ĉŭar.**

A.—What's that?

P.—The **ŝŭar.**

A.(mystified)—Don't get you!

P.—The **ĉojr**; (trying again)—The **hojr**; the **hoir**: Ho! what you call? Here! (pointing out the word in the dictionary.)

A.—Oh! The kŭaj'r!

—Prujno.

* * * * * *

**Nebruulinoj.**—La plej agrabla okazantaĵo ĉe la kinemataj bildoj estas ke kiam la virinoj malfermas la buŝojn oni ne povas ilin aŭdi.—London Opinion. —Bopomano

* * * * * *

**Fortaj Rimedoj.**—"Kial ĉi-tiu kritikulo fariĝis tiel senkompata pri la muzikistoj?" — "Ĉar li aŭdis la muzikistoj mem kritikantaj unu pri la alia. —Washington Star. —Bopomano

Digitized by Google

## BOOK REVIEWS

**Raporto Stenografia,** alfaro de la angla sistemo Pitman al Esperanto, M. C. Butler, 5th Edition, 2s 6d at B. E. A.—To me as an Esperantist for the past 15 years and a user of Pitman for the past 30 this seems an important work well worthy of study. The writer invites proposals for improvements, and will gladly answer questions; he will be happy to receive and list for possible interrelations the names of those using the system. I certainly hope that many of us will learn it. G. W. Lee.

**Faka Vortareto pri Peltoj**—a leaflet giving a proposed basic terminology for the fur trade, 2d. at B. E. A., 17 Hart St., London, W. C., England.

**Dictionnaire Complet Esperanto-Francaise,** Grosjean-Maupin, 2me ed., cloth, 242 p., 6f. at E. C. O., 51 rue de Clichy, Paris, France.—This corresponds to the Millidge Dictionary in English, having in addition a handy list of sources for all unofficialized roots. The excellence of the work will be indicated by the very pettiness of the slight errors noted. Cats do not **miaui** but **miaŭi,** (v. chat). In the source-list **sturmo** is probably a misprint for **sturno** or **ŝtormo** of the book proper (the latter, as defined, is a needless duplication of **ventego** or **uragano**); the letter number system of reference is a bit cumbrous and not complete; e.g., **dekoracii.** O (what does "O" mean?).

**Elektitaj Poemoj de Heine,** Pillath, 5.40 M. at Esperanto Verlag F. Ellersiek, Berlin, S 59, Germany—Twenty-three carefully chosen and expertly rendered gems. Especially attractive is the dramatic Donna Klara. The metrical and space requirements are carefully observed making this a very attractive booklet.

**Libereco de Konscienco kaj la Tutmonda Framasonaro,** Sluys, Delgarbo, 19p., 1 r. k., 4s. Kleiner Beerstraat, Antwerp, Belgium.—This book explains the reasons for and the labors of Masonry in a legible but not always correct Esperanto. The book should be in the hands of all Masons, even though its somewhat extreme attitude seems more understandable in Belgium than in our own land.

**Amo per Proverboj,** Azevedo, Fernandes, 16p. komedio, 3 r.k., at Oskar Ziegler & Co., Marktredwitz, Bavaria, Germany—Especially interesting to "spertuloj" as a work of translation, since the greater part of its content is a repartee of proverbs.

Ricevitaj kaj recenzataj estas:

Interesa Novelaro—Fethke.
Perloj el Oriento—Osaka.
Welthilfsprache in zwei Wochen—Pankratz.
Samouszeck Esperanto—Kronenberg.
Kiel Oni Fondas kaj Organizas E. Grupon—Sappl.
Kia Stranga, Forta Voko—Klemetti.
Vollstandiges Lehrbuch—Mobuscz.

A. E. would like volunteer reviewers from among the "spertuloj" for such books as cannot be reviewed by us.

Digitized by Google

## OFFICE NOTES

Ask your newspaper to reprint the Congress circular—the whole or a part.

Our catalog prices are **subject to change without notice,** owing to frequent changes abroad.

Secretaries of E. A. of N. A. groups are requested to send in final reports for the year by July 1st together with membership dues, so that the annual report can be made up showing the maximum membership.

Any news from Esperanto groups, whether affiliated with the Association or not, will be welcome.

If you have interesting letters, cards, flags or souvenirs of any kind bring them to the Congress for the exhibit, and if you cannot bring them, send them to us properly marked for return after the Congress. We shall have a much larger exhibit of Magazines than has been possible since before 1914,—and a room in which they can be shown to good advantage.

Our special book room will have a good supply of all the usual text books, dictionaries, books for reading, translations and original works; also Privat's "Life of Zamenhof," and a new translation by President Payson.

If you wish Congress circulars sent to any friends, send postal request for same.

Send in your orders early for extra copies of the Congress issues of Amerika;—July-August for the Boston and September for the Praha International Congress.

We would welcome names and addresses of Esperantists who are not now in touch with the movement so we can send them news.

We are happy to announce that Editor Scott has taken a number of pupils in correspondence lessons (at present at the rate of $ .75 per lesson). Even we "spertuloj" might well learn more and get fit for the rapidly approaching boom. Don't let it catch you unprepared.

Members who can not be at the Congress in Boston please note Article VII, section 3, of our Constitution regarding proxies, printed in the September, 1919, number or obtainable on request from the office.

The Propaganda Committee request clippings, reports of articles and editorials in newspapers, magazines, etc., in regard to Esperanto, to help them keep posted on its progress. Lewis H. Maury, Chairman, 321 West 58th St., New York City.

---

## POR NIA MOVADO !

Ŝajnas al mi gravegaj du aferoj:

1. ebleco pliperfektigi Esperanton **laŭ laŭleĝaj metodoj.**
2. konservo de la definitiva aŭtoritateco super la lingvo **ĉe la multaj.**

(Precipe pro la lasta kaŭzo mi ne rejetas la nomon—donita de ŝtonigema akademiano—de "io-emulo." Prujno.)

Digitized by Google